

1^a trimestro 2011

En tiu numero vi legos..

D. Baron donas klarigojn pri la lanterno de Rochecorbon.	p.1
J.-J. Moreau tandemis kaj tendumis en la Baltaj landoj en 2010, li rakontas...	p.2 p.3 p.4 p.5
Raita Pyhälä, kiu verkas sub la nomo "Saliko", gastigata de J. kaj G. Layseman antaŭ Kristnasko, vizitis Turon.	p.5
Por solvi la 2 ŝaradojn proponitajn de B. Turbillon, necesas bone koni la esperantan alfabeton.	p.5
Kompletigu la malplenajn vezikojn por rakonti historion, proponas J.-L. Le Brizault. Ni aperigos vian verkon sur venonta T.L.	p.6
Tara Gregers, la dana leteramikino de J.-M. Simonet prezentas al ni la tulipon "Esperanto".	p. 6
Necesis esti tre lerta por malkovri la solvon de la enigmo "La mallerta vitrolavisto" !	p.6
Sen aŭ kun ĉapelo, daŭrigo de la listo.	p. 7
Pistakojn oni ne nur uzas kun aperitivo, J. kaj G. Layseman donas la recepton por meti ilin en kukojn.	p.8
Ĉu la hundoj komprenas esperanton ?	p.8
A. Aude rakontas.	



La lanterno de Rochecorbon

La vilaĝo de Rochecorbon situas oriente de la urbo Tours (Tur) borde de la riverego Loire (Luar), kaj flanke de monteto. Dum la IXa Jarcento Rochecorbon nomiĝis Vosnes (en la latina : Vodanum) kaj apartenis al la kanonikaro de la katedralo de Tours. Hardouin, episkopo de Tours (960-980) konstruigis la kastelon 'Les Roches' (La Rokoj), kiu superstaris la valon en la Xa jarcento. Li donis ĝin al sia nevo Corbon, kies nomo, pro tio, farigis Rochecorbon. En 984 Corbon III des Roches estis la unua senjoro de Turanĝio, kiu uzis en siaj nobelaj titoloj la formulon 'dank'al la favoro de Dio' kiu poste apartenis al la reĝoj. En 1095, Robert des Roches konstruigis kvadratan turon ce unu el la anguloj de sia kastelo, nomita poste Lanterno. En 1189, volante rabi la provincon, Richard Cœur-de-Lion (Rikardo Leon-

kora), reĝo de Anglujo, helpata de la franca reĝo Philippe Auguste (Filipo la Granda), atakis la kastelon, kaj sturme ĝin kaptis. Li volis depreni Turanĝion de sia patro Henri II Plantagenet. Post anekso de la provinco al la franca krono en 1203, Filipo la Granda prenis kun si eliton de kavaliroj. La senjoro de Rochecorbon estis unu el la ĉefoj de la bravuloj, kiuj portis sian standardon al la batalo de Bouvines en 1214. Tiu fama batalo estis grava venko de la franca reĝo kontraŭ la angloj kaj iliaj kunliganoj. La kastelo estis malfortikigita far la angloj, kiuj ĝin kaptis en 1424. La senjorbieno de Rochecorbon, kiu entenis tri kastelbienojn kaj 23 feŭdojn, iĝis posedaĵo de la vicgrafo de Thouars (Tuar) en la XIVa jarcento. En la XVIIa jarcento ĝi estis parto de la dukejo de Luynes ĝis la Franca Revolucio. En 1794 la kastelo estis ruinaĵo.

Nuntempe, sola restaĵo de la kastelo, la lanterno superstaras la urbeton Rochecorbon sur la kreteca roko traborita de multaj trogloditaj logejoj. Tiu kvadrata turo, 11 metrojn alta, utilis kiel lumsignaloj avertantaj la garnizonon de la najbara kastelo de Amboise (Ambuaz), okaze de minacanta danĝero.

Dominique Baron

Saluton la Junuloj,

De malmulta tempo, ni ambaŭ revenis hejmen. Ĉiam estas malfacile (readaptiĝi) resupreniri la supraĵon post longa vojaĝo, tial mi malfruis pri mia respondo. Lasttempe ni iris tandemi en Anglion, neniam ni biciklis en tiu lando. Ni ruliĝis maldekstre en Dovera kamparo. Tiu regiono aspektas malriĉa, la porbiciklaj vojoj estas malbone zorgitaj, la senkulturrejo kreskas vojrande, k.t.p.

Mi prezentas nin. Ni estas anoj el la tandemklubo de Francio, gepensiuloj. Mia edzino sesdek unu jaraĝas, mi sesdek tri. Geestroj de nia propra presejo dum dudek kvin jaroj en TOURS (en la Luara kastelara regiono de Francio). En nia Amikaro estas anoj el diversaj landoj. Ni eldonas libreton kiel Pasporta Servo, utilan ilon por kiu vojaĝas tandeme. Ni estas promenantoj, preferante interbabili en la naturo kaj malkovri novajn landojn ol konkursi, tiel oni povas kompari la diversajn vivnivelojn al tiuj de Francio. Tial mi konsilas al ĉiuj fari kiel ni. La konkurso ne estas nia afero.

Nun, jen nia verko pri nia isa periplo.

PERIPLO TRA LA BALTAJ LANDOJ

La dudek kvaran de Majo dumil dek, el TOURS, ni ambaŭ ekiras. Laŭvoje ni retrovas kvar aliajn parojn, kiuj rendevuis kun ni.

La unua lando trapasata estas Germanio. La trikolora landflago konsistas el la nigra, kiu simboligas la aglon, la ruĝa ĝian bekon kaj la ora ĝiajn kroĉungojn ; tiuj koloroj estis tiuj de armiloj de la Sankta Imperio romangermana. La loĝantoj ege respektas la biciklantojn (imitandan konduton), ĉie oni rimarkas la disciplinon, tiel dank'al tio, la lando, iom post iom prosperas (ankoraŭ imitandan konduton). La vojaro estas perfekte zorgita, la gudro ĉe vojrande rektas, sen misaĵo. Facile ni trovas la tendumejojn, kiuj estas ĉiuj puregaj, kia plezuro !

Antaŭ nia vojaĝo, per jarlibro, mi skribis



mane, leterojn al du germanaj esperantistoj, kiuj ne havas retadreson, ili respondis plezurigante min. Mi renkontas la unuan en la tendumejo de la urbo ODESBACH. Li parolas malrapide, tiel mi komprenas la tuton. Ni estas en la Rejna regiono, ĉie kreskas la vito, mirindan lokon... sed ne ebenan. La vetero estas ĉu printempa, ĉu vintra, kelkfoje, la temperaturo tiel malaltas, ke mi revas pri mia hejma kameno. La dekkvaraj procentaj deklivoj dolorigas la kruojn, ni devas piede puŝi la tandemon por ne rompi la ĉenojn. La tandemo havas du ĉenojn, unu por ligi la du tandemistojn, unu por antaŭenpuŝi la duradan veturilon. Tie ni biciklas en la ĉirkaŭmontaron el Vogezoj. Kelkfoje ni renkontas panelojn sur kiuj oni povas legi : « spurinen » (spuron), « nur forst » (nur por forsto), « hunde » (hundon), « difekt » (difektan) k.t.p. Unufoje pli mi konstatas ke dank'al Eo mi povas kompreni iom. Zamenhof estis, estas kaj estos geniulo. Trapasante la eksorientan Germanion, ju pli ni antaŭeniras, des pli ni trovas alian etoson, la laboristoj kiuj prizorgas la vojaron ŝajnas pli mallaboremaj ol la laboristoj antaŭe renkontitaj, ili ofte enpoŝigas la manojn. Ni, kiuj iam bicikladis en Rusio (ni laŭiris la Volgon), havas la impreson ruliĝi en tiu lando. Ĉio ŝajnas malĝoja, eĉ la naturo ; estos tiel, kiel en la trapasotajn landojn. La rusoj pardonu min, sed mi priskribas kion mi sentas.

La okan de Junio, ni vizitas la urbon LEIPZIG dank'al esperantisto nomita Hieronymus Stroinski. Antaŭe mi skribis kaj li respondis donante rendevuon en la ĉefa stacidomo. Li estis esperante vestita. Li estas pli ol sesdek

jaraĝa, li naskiĝis ĉiurbe, konas bonege sian urbon. La tago estas memorinda. La bonulo marŝas rapidege. Inter aliaj lokoj, li montras al ni la kirkon kie ripozas por ĉiam J.-S. Bach. Ni eniras la tendumejon elĉerpitaj, pli ol ni estas post centkilometra tandemado.

La naŭan ni trairas la Elbo-n, en tiu momento mi pensas al Napoleono, plie ni ruliĝas kun du grumblantoj, estas kaj estos malfacile kunvivi kun ili.

Jen aperas Pollando. La landdukolora flago konsistas el la blanka, kiu simboligas la purecon kak la ruĝa la batalecon.

Kiel kutime, la vojaro difektitas, ni malkovras la ekfinon de inundoj de la Vistulo, multaj sablsakoj kuŝas riverborde. Ofte oni devas elvojiĝi kaj uzi padojn malbone pavumitajn, kie svarmas mikroskopaj moskitoj. Antaŭ ol preterrenkonti kamionojn, oni devas aerplenigi la pulmojn ĉar ili kirlas la polverojn blindigante niajn okulojn. Dimanĉe, la katolikanoj iras al la meso, ili stiras aĉe la veturilojn, oni devas senĉese atenti. Laŭvoje kuŝas tomboj, feliĉe al ni, neniuj akcidento okazis. Poloj fieras stiri rapide, verŝajne tio signifas, laŭ ili, ke ili estas potencaj. Ni tranoktas en la tendumejo en POZNAN. En la turismoficejo mi petas dokumentojn en Eo. Stulte la deĵoranto ridetas kaj neas. La nesciado kaj la stulteco ne havas landlimojn. La landa mono nomiĝas Zloty. Unu eŭro valoras kvar komo kvindek kvar Zloty-jn.

Nun, jen Litovio. La mono nomiĝas Litas. Unu eŭro valoras « tri komo kvarcent kvindek du Litas-n ». La trikolora landflago konsistas el la flava, kiu simboligas la kampojn sub la suno, la verda, la riĉecon de kamparoj kaj la ruĝa, la sangon de la sendependeco. Litovio aniĝis en la eŭropa komunumo, la unuan de Majo dumil kvar.

La vetero estas tiel pluvega ke, anstataŭ ol tranokti en tendumejo, ni elektas hotelon en Marijampole, ni frandas la lukson. La morgaŭan tagon ni tranoktas en KAŬNAS. Kvankam mi sendis retmesaĝon al ĉefdeligito, li ne respondis al mi, do, mi serĉas la esperantistan lokon de la urba klubo, kiu situas Strato L.

Zamenhof. Sur la pordo de la domo estas gluitaj memglueblaj bildoj pri Eo. Mi frapas ĉe la pordo, neniuj respondas, do mi ekforiras renkontante esperantiston, kiu eniras en la domon. Li diras ke la klubo malbone kaj malofte funkcias. La plafonoj estas falontaj, la domo ruiniĝas, la herbo kreskas en la pluvkanaletoj, mi estas elrevita por la dua fojo.

La dudek kvaran de Junio. Antaŭe, ni antaŭvidis «sovage » (en la franca tio signifas tendumi ne en tendumejo) tendumi ĉe la rezervo pri bizonoj, ni ne trovas la lokon, ni devas elekti alian dormlokon. Mia edzino, per la manoj petas de paro da kamparanoj la permeson starigi la tendojn sur ilia herbejo, ili jesas. Post la starigo, niaj afablaj gegastigantoj eliras per sia Mercedes. Poste, ili revenas kun buterbulego, bieroj, fromaĝo, akvomelono, brando, kuko. Ili ofertas la tuton al ĉiuj. Per la manoj ni provas danki ilin sukcese. Ĉien, kien oni biciklas, la homoj, pro nia vojaĝmaniero, pensas ke ni ne havas sufiĉe da mono por vojaĝi veturile, tial ili estas malavaremaj. Dum niaj periploj iuj donis al partoprenantoj, monon, panon... Malpli la homoj estas riĉaj, despli ili estas malavaraĵ. Tio estas bona leciono... oni primeditu ĉi-tion. Por danki niajn gastigantojn, ni ofertas etajn ejfelturojn, ĉiam tio plezurigas... ĉefe la infanojn, ili preferas la oritajn pli ol la arĝentitajn aŭ la bronzitajn.

La dudek sepan de Junio. Eniro en Latvio. La mono nomiĝas Latvia Lats. Unu eŭro valoras nulo-n komo sep mil ducent okdek lats-n. La trikolora landflago konsistas el la blanka kaj la grenatkoloro, kiuj estis la koloroj de Latvoj en la dekoka jarcento. La lando aniĝis en la eŭropa komunumo en la jaro dumil kvar.

De post la Orienta Germanio, la domoj, la vojaro, la naturo, k.t.p. estas malbone zorgitaj. Krom en la grandaj urboj, ĉio ŝajnas malĝoja (ĉu la tieaj loĝantoj pensas kiel mi ? verŝajne ne). Estas malfacile trovi sian propran vojon por vivi respektinde. La komunismo lasis multajn vundojn en la mensoj. Kelkaj landanoj rifuĝas en alkoholo, malbona afero por la baltaĵ homoj ; la aliaj rifuĝas en religio, pro tio,

oni povas ofte admiri belegajn preĝejojn kun tombejoj bonege, zorgege floritaj.

Ĉe la teraso de kafejo, ni renkontas francojn, ili estras orfejon por junuloj, kiuj lernas la agrikulturon. Ili diras, ke la metilernado ne ekzistas kaj la ĉefa problemo estas ĉi-tie : ĉiuj faras ion ajn sen koni entute la metiojn. Jen grandega tasko por la sindonemuloj.

La dek naŭan de Junio. Eniro en Estonio-n. La mono nomiĝas Eek. Unu eŭro valoras dek kvin koma sescent kvardek ses Eek-n. La trikolora landflago konsistas el la blua kiu simbolas la ĉielon, la lagon kaj la maron, la nigra la naskiĝteron kaj la blanka, la purecon kaj la fidon pri estonteco. Arbara, marĉa, torfeja, insulara lando. Pli ol la baltaj landoj, Estonio estas norda lando. Ĝi suferis pro multaj invadoj. Rusio ne ŝatas Estonion, Estonio ne ŝatas Rusion (domaĝe), la vundoj hodiaŭ ankoraŭ ĉeestas. Estonio eniris la eŭropan komunumon la unuan de majo dumil kvar. La lando ŝajnas iom malpli malriĉa ol la trapasitaj landoj

(krom Germanio), verŝajne pro la proksimiĝo ĉe Finnlando. La veturantoj estas respektmaj al la piedirantoj kaj al la biciklantoj. Kiam piede oni alproksimiĝas al porpiedirantaj pasejoj, la ŝoforoj haltas, ni surpriziĝas.

TALLINN, la ĉefa urbo, belegas. La vojoj estas malpli truplekaj ol en kamparo. Dum tri tagoj ni vizitas la urbegon, la muzeojn, la diversajn preĝejojn. Tie ni restadas en mezepoka ĉefurbo. La konstruado komenciĝis en la jaro mil cent kvindek kvar. La stratoj zorge pavumitaj per rondaj pavimeroj ne renkontas sin ĉe rekta angulo, sed la vojkruciĝoj havas formon de rondigitaj anguloj. La plej malnova apoteko el la mondo situas en Tallinn ; nun ĝi estas ankoraŭ aktiva. Legendo asertas ke oni inventis la marcipanon tie tuj post la mezepoko. En la lando oni distilas la faman likvoron t.n. « Vana Tallinn » ; oni trinkas ĝin sen akvo, aŭ post kafo aŭ en glaciaĵo, kelkaj el ni ekbriiĝis post gustumado.

La ĉirkaŭmuro dukilometrojn longa enhavas ankoraŭ dudek ses turojn por gardostaro.


Oni povas pagi la parkadon per poŝtelefono (he jes sinjoro !), tie oni estas en moderna lando, kiu inventis Skype-n !.

Ĉiun kvinan jaron okazas la Estona Festo pri kantoj, kiu kunigas tridek kvarmil kantistojn.

Situata ueste de Tallinn, « Rocca al Mare » (tradukon ne necesas) estas ĉefe konata pro sia vastega subĉiela muzeo. Multe da pajlokovritaj domoj staras dise, senkamentubaj ĉar la loĝintoj timis fajrigi la pajlon de la tegmento. La domoj estas ĉiuj malsamaj, ili estas rekonstruitaj. La ega loko entenas farmdomojn depost la dekoka ĝis la dudeka jarcentoj. Ankaŭ staras muelejoj, kapelo, eĉ vilaĝa lernejo donacita de la filino de eksposedanto, kiu estre instruis en ĝi.

Ni loĝas en la junularan gastejon. La apartementoj estas laŭ « komunisma stilo » : la kuirejo, la banĉambro, la necesejo estas komunaj. Oni provas imagi kiel la loĝintoj kunloĝis, kunvivis verŝajne malfacile.

Ni retrovas aliajn tandemistojn, kiuj venis tien, ĉu ŝipe, ĉu aviadile, ĉu per privata veturilo. Entute ni estos dudek ok partoprenantoj



plus unu ruso, kiu veturigos niajn sakojn dum la sekvo de la periplo al Rusio. Mi ne ŝatas esti helpata, do mi konservas niajn bagaĝojn en mia remorko. Mi opinias ke helpo malgrandigas la rezulton.

Jean-Jacques Moreau
(Sekvo de la vojaĝo sur venonta T.L.)

Antaŭ julo en la franca urbo Tours

Fine de novembro la urbo Tours (cent kvardek mil loĝantoj) ŝaltis siajn julo-lumojn, dek kilometrojn da diversaj lumgirlandoj super stratoj, ĉirkaŭ fosto kaj sur arboj. Antaŭ la urbodomo, ĉiam ornamata per la trikolora flago, staras altega abio kovrita per bluaj girlandoj kaj bantegoj kaj elektraj ampoloj. Super la stratoj la lumoj plejparte estas LEDoj, per kio la urbo malpliigis siajn jarfinajn lumigokostojn, kiuj nun estas kvin mil eŭroj sed antaŭe kvaroble pliaj. La lumaranĝoj malsamas super ĉiuj stratoj. La koloroj varias de blua ĝis roza kaj blanka. La julobazaro en longa rektabulevardo konsistas el kvindek du lignaj budoj, kie estas vendataj ĉiaj ĉarmaj objektoj, muzikiloj, rostitaj kaŝtanoj kaj varma vino. Inter la budoj staras ankaŭ la laborejo de koboldoj kaj troveblas la poŝtkesto de Julavo. Finnaj koboldoj apenaŭ rekonas siajn francajn kuzojn "lutins", vestitajn verde-brune-flave.

Finna (aŭ skandinava) koboldo.

En la finna "Tonttu", en la sveda "Tomte"



En la bazaro oni kolektas ankaŭ uzitajn ludilojn kaj donacojn por nebonhavaj familioj. La bazaro daŭros ĝis Silvestro. Ĉe la stacidomo staras altega bela granda karuselo, kiu malrapide turniĝas kun infanoj sidantaj sur ĉevaloj, azeno, porketo, elefanto kaj aliaj bestoj belkoloraj. Kvardek metrojn alta rado (kiel nia *maailmanpyörä*) atendas kuraĝetulojn dezirantajn vidi la urbon en birda perspektivo. Akvo spruĉas kaj lirlas en grandaj rondaj fontanoj, kies koloron elektraj lampoj jen kaj jen ŝanĝas. Infanoj povas amuziĝi ankaŭ en flava elektra trajneto. Falas iom da neĝo, kaj tuj francoj ektimas trafikajn katastrofojn. La gazetoj kaj televido avertas pri glatiso. Ĉiun elsendon antaŭas bildoj pri subneĝiĝintaj veturiloj, neĝo-plugiloj kaj homoj teruritaj pro malvarmo, kiu tamen apenaŭ estas minusa, nur ĉ. la nulo.

Kopiita paĝo el la gazeto de la E-asocio de Finnlando, decembro 2010. Mi verkis tion ĉe Jeannine kaj Gérard Layseman.

Saliko



Ŝaradoj

- ✧ Mia unua estas unuo de tempo (radiko).
- ✧ Mia dua estas romana cifero.
- ✧ Mia tria estas la naŭa grafemo en la alfabeto.
- ✧ Mia tuto indikas la horon.



- ✧ Mia unua estas la 13-a konsonanto
- ✧ Mia dua estas la antaŭa konsonanto de mia unua.
- ✧ Mia tria estas la sekva konsonanto de mia unua.
- ✧ Mia kvara komencas tiri.
- ✧ Mia kvina estas romana cifero.
- ✧ Mia tuta tiras vagonojn.

Bérengère Turbillon



1. Kompletigu la 1-an kaj la 2-an vezikojn.
 2. Imagu la 3-an bildon, kiu estas la fino de la rakonto !
 3. Sendu al ni vian propran rakonton.
- Jean-Louis Le Brizault

Tulipo Esperanto

Ĉu vi konas ĉi tiun belan floron ? Ĝi estas ruĝa, sed notu la verdan strion. La esperantisto S-ro J. Prangere el Nederlando malkovris la tulipon en 1968 ; ĝi estas mutacio de la tulipo nomata "Hollywood". En 1979 ĝi rivecis kvalifikon "Tulipo Esperanto".

Tara Gregers



Solve de la enigmo
"La mallerta vitrolavisto"

TAGO	INCIDENTO	TEMPO	STRATO
Lundo	hundo	14a	Jupiter strato
Mardo	malĝusta	13a	Lekanto
Merkredo	falis	15a	Stacistrato
Ĵaŭdo	sitelo ŝtelita	10a	Fazanaleo
Vendredo	rompis fenestron	11a	Parkstrato

Sen aŭ kun ĉapelo ? *

esperanto	français	esperanto	français
samo	la même chose	ŝamo	peau de chamois
Sanĉo	Sancho	ŝanco / Ŝanco	chance / Chanceaux
sango	sang	ŝanĝo	changement
sario	sari (vêtement)	Ŝario	Chari
sarko	sarclage	ŝarko	requin
sati	être rassasié	ŝati	apprécier
sedo	orpin (botanique)	ŝedo	hangar
sego	sciage	seĝo	siège
selo	selle	ŝelo	coquille, écorce
semo	semence	Ŝem(o)	Sem (Bible)
sero	sérum physiologique	ŝero	récif
serĉi	chercher	ŝerci	plaisanter
serpo	faucille	ŝerpo	sherpa
si	soi	ŝi	elle
siko	sikh	ŝiko	du chic, de l'allure
silo	silo	ŝilo	Silo (Bible)
sinko (vidu sinki)	tassement	ŝinko	jambon
siro	sire	ŝiro	déchirure
skoto	écossais	ŝkoto	écoute (marine)
soforo	sophora (botanique)	ŝoforo	chauffeur
soko	soc	ŝoko	choc (moral)
sorto	sort, destin	ŝorto	short
sparo	spare (ich.) longeron	ŝparo	épargne
spato	spath (minéral)	ŝpato	bêche
spico	épice(s)	ŝpico	grand loulou
spino	spin (physique)	ŝpino	filage
sproso	pousse, rejeton	ŝproso	petit bois (menuiserie)
spuro	trace, empreinte	ŝpuro	voie (d'une auto)
stalo	étable	ŝtalo	acier
stato	état, manière d'être	ŝtato	état (politique)

*Eltiraĵo de la libreto de Jacques Gaumé " Sen aŭ kun ĉapelo ",
 franca traduko de la libreto de Josef Murĵan " Por kio ĉapelo ? "

Pistakaj magdalenaj kukoj



Pretiĝo : 15 mn

Kuirado : 10 / 12 mn por 18 kukoj

Ingrediencoj :

- ✱ 1 ŝelo de ne traktita citrono
- ✱ 2 dikaj ovoĵ aŭ 3 etaj
- ✱ 150 g da pulvorigita sukero
- ✱ 150 g da butero
- ✱ 170 g da faruno
- ✱ 1 saketo da gistpulvoro
- ✱ 2 supkuleroj da verdaj ne salitaj pistakoj
- ✱ 1 buterpeceto por la muldiloj



1) Varmigu la fornon je varmeco 200° aŭ 6/7. Grasumu la muldilojn.

2) Rompu la ovojn, metu la tuton en salatuĵon. Kirli la ovojn kun la sukero dum minimume 5 minutoj por obteni ŝaŭman miksadon.

3) Fandigu la buteron en kaserolo kaj verŝu ĝin sur la ovsukeran miksadon. Aldonu la farunon, la gistpulvoron kirlante la tuton.

4) Pecetu la citronŝelon kaj aldonu ĝin al la preparado.

5) Verŝu ĝin en la muldilojn.

6) Kunpistu la pistakojn kaj surŝutetu ĉiun kukon.

7) Baku forne dum 10 ĝis 12 minutoj.

8) Elmuldigu la kukojn kaj lasu ilin malvarmiĝi antaŭ gustumi ilin.

Jeannine kaj Gérard Layseman



Ĉu la hundoj komprenas la homan lingvon

Ni havis en Bavario, je ĉirkaŭ tridek kilometroj de Munkeno ĉarman amikino Betty, tre gaja. Estis agrable paroli kun ŝi, ĉar post la unua mondmilito ŝi estis servistino en familio de franca oficiro. Ŝi ofte francigis esperantajn vortojn.

Iam ni iris kun ŝi fari aĉetojn en apudaj vendejoj. Antaŭ unu troviĝis aminda hundeto, kiu alproksimiĝis je ĉiu pasanto por ricevi karesojn. Ĉiuj diris al ĝi kelkajn vortojn. La hundeto montris sian kontenton, li ankaŭ venis al mi. Mi, kun plezuro karesis lin. Li montris sian kontenton kiel ĉiu kontenta hundo, rapide moviĝanta la voston. Mi tuj parolis al li, diris kelkajn amindajn vortojn en Esperanto. Tuj la hundeto grumblis, fariĝis agresema, do mi silentis, ankaŭ ĝi, kaj mi demandis min : ĉu la hundo ne ŝatas Esperanton, aŭ nur ŝatas la germanan lingvon ?

André Aude



Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr